- 6.4.** Plano por informado

7. Elektoj

- 7.1.** Arbitracia komisiono

La komisiono konsistas el tri membroj: Anneke Schouten-Buijs (2022-2025) kaj Hiddo Velsink (2022-2025). La tria membro estas Johan Swenker (2020-2023). Johan Swenker estas reelektebla por nova trijara periodo.

7.2 Estraro

7.2.1 Elekto de aliaj estraranoj. Kandidatoj estas serĉataj.

7.3. Kaskontrol-komisiono

La kaskontrol-komisiono por la jaro 2022 estas Ronaldo Nobel kaj Smaranda Tintu. Rezerva membro estas Ans Bakker- ten Hagen. Novaj membroj por la jaro 2023 estas serĉataj.

7.4 Komitatano A ĉe UEA

Kandidato estas serĉata.

8. Fenikso

9. Informado pri diversaj temoj:

9.1. Kultura tago

9.2. Eventuale informado pri aliaj temoj

10. Jubileantoj

10.1 Ni honoras la membrojn, kiuj festas sian 50-jaran membrecon.

10.2 Mi mencias la membrojn, kiuj antaŭ 25 jaroj aliĝis al la asocio

11. Verloren van Themaat-premio.

La ĵurio anoncas la rezulton pri la jaro 2022.

12. Ronddemandado.

13. Fermo

Ineke Emmelkamp, sekretario

Groningen, la 5-an de februaro 2023

Ferio en Herzberg

Enveturante la pitoreskan urbon Herzberg am Harz (en la mezo de Germanio) per aŭto aŭ trajno oni tuj rimarkas la tabulojn “Bonvenon en Herzberg, la Esperanto-urbo” kaj la Esperantlingvajn vojmontrilojn, kiuj kondukas al la sidejo de la Interkultura Centro Herzberg (ICH) kun sia belega Esperanto-ĝardeno. Dank’ al la kelkjardeka agado de lokaj esperantistoj, fervojisto Joachim Gießner (1913 - 2003) kaj la loka Esperanto-klubo, kaj dank’ al la ĝis hodiaŭ daŭre tre aktiva kaj multflanka laboro sub gvido de Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, la urba konsilantaro decidis aldoni la kromnomon ‘die Esperanto-Stadt’, t.e. ‘la Esperanto-urbo’ al la urbonomo en la jaro 2006.

Mi ofte vizitas Herzberg por volontule helpi ordigi Esperantajn librojn en la ampleksa biblioteko. Herzberg organizas multajn Esperanto-renkontiĝojn, kursojn (somere ofte en la ĝardeno apud la Esperanto-tulipoj kaj rozoj de la Espero) kaj ekskursojn al la belega Harz-montaro. Mi ĉeestis Esperanto-inaŭgurojn kun la urbestro kaj lokaj kaj internaciaj organizoj tie, ekzemple de Esperanto-benke, tabulo sur la turo de la Knollen-monto, amikec-paliso, aŭdio-gvidilo en la Welf-kastelo. Ĉi tiuj indas por la turistoj kaj videbligas Esperanton. Multaj venontaj projektoj estas planitaj.

Rigardu en la retejo de la ICH por malkovri pli pri la riĉa programo: <https://esperanto-urbo.de>. Ekzemple mi kore rekomendas la Kulturturismajn Tagojn (22 majo 2023 - 26 majo 2023) en Herzberg kaj ĉirkaŭaĵo. Tio okazos tuj antaŭ la jubilea kongreso de Germana Esperanto Asocio en Braunschweig (Brunsvigo) <https://www.esperanto.de/eo/germana-esperanto-kongreso>), nur 85 kilometrojn norde de Herzberg. Mi mem certe ĉeestos ambaŭ eventojn. Mi esperas renkonti vin tie.

Raportas Andries Hovinga



Mi kun Zsófia kaj Peter sur la Knollen-turo.



La landaj flagoj bonvenigas la vizitantojn.



Ordigo de libroj de la ICH-biblioteko.



Esperanto-leciono en la ĝardeno de ICH.



Manĝo en la seminaria ĉambro de ICH.



Inaŭguro de Esperanto-benke.

Programo de Esperanto Noord-Nederland en 2023

La 24-an de januaro klubo 'Esperanto Noord-Nederland' (provincoj Groningen, Friesland kaj Drenthe) kunvenis en la apartamento de nia plej aĝa membro Wil van Ganswijk en Groningen. Ni sidis komforte kune en la salono apud la varma hejtilo, krokodilis iom nederlande, babilis iom Esperante, frandis la ĉokoladan Esperanto-prezenton kiun la Esperanto-klubo el Alkmaar donacis al Ineke Emmelkamp, trinkis kafon kun sukero ĉerpita el la sukero per Zamenhof-kulereto, trafoliumis dosierujojn plenajn de Esperanto-instrumentaro kaj kolekton de malnovaj gazetartikoloj kaj libroj.

Cetere ni planis la ĉi-jarajn renkontiĝojn. Vi estas bonvena. Ni kunvenos kelkfoje fizike, kelkfoje en Zoom.

Ho jes, ni eĉ telefonis al Zamenhof, jes ja, al Zamenhof, aŭ pli precize dirite, al la Zamenhof-lernejo en Leeuwarden. Ni lunĉos tie la 21-an de marto 2023 en la manĝejo de la lernejo, nomata "Tagmanĝo". Sciigu nin se vi ŝatus kunmanĝi!

La klubo Esperanto Noord-Nederland:
<https://www.pingveno.nl/klubo/index.html>
 (La datoj de la kunvenoj legeblas en la menuo sub "Aktuale")

*Bonvenon
 en Nord-
 Nederlando!*

Pri CCSG Comenius Zamenhof




CCSG Comenius Zamenhof estas lernejo en la urbo Leeuwarden por antaŭprofesia sekundara edukado kaj praktika edukado, karakterizita per la ideo 'lerni farante' en pluraj grandaj praktikaj klasĉambroj. Ĝi havas 719 lernantojn.



di 7 febr. 2023	19.45 uur	Bij Wil thuis (Groningen)
di 21 febr. 2023	19.45 uur	Zoom vergadering
di 7 mrt 2023	19.45	Bij Wil thuis (Groningen)
di 21 mrt 2023	13.00 uur	Leeuwarden, eten in restaurant Tagmanĝo
		Robert Kochstraat 6, 8921 VX Leeuwarden
		12,50 eŭro – warme lunch drie gangen
		www.csg-comenius.nl
		tagmagnobusiness.site
di 4 apr. 2023	19.45	LEDENVERGADERING, bij Wil thuis (Groningen)
di 18 apr. 2023	19.45	Zoom vergadering
di 2 mei 2023	19.45	Bij Wil thuis (Groningen)
di 23 mei 2023	18.00	Eten bij Mennoos Kookerij
		Paterswoldseweg 267, 9728 AC Groningen
		www.mennooskookerij.nl
do 6 juli 2023	10.30	Koffiedrinken in restaurant Meerwold,
		Laan Corpus den Hoorn 300, 9728 JT Groningen
		www.meerwold.nl
do 17 aug. 2023	10.30	Koffiedrinken in restaurant Scandinavisch Dorp
		Oude Badweg 1, 9766 TJ Eelderwolde
		www.scandinavischdorp.nl
di 26 sept. 2023	19.45	Bij Wil thuis (Groningen)

Venu al la Kultura Tago 2023!

Kom naar de culturele dag 2023!



Zaterdag 24 juni in Maastricht

De culturele dag in Woudrichem was vorig jaar zeer geslaagd en we zijn verheugd om te melden dat dit jaar deze dag zal plaatsvinden in de prachtige stad Maastricht.

We beloven dat het weer een gezellige en interessante dag zal worden waarbij een stuk vlaai zeker niet zal ontbreken. Een tipje van de sluier: een deel van het programma zal in het teken staan van Maastricht als vestingstad.

Ons programma start om 10:30 en zal duren tot 18:00. Aansluitend zal een gezamenlijk diner plaatsvinden waarbij we kennismaken met de Limburgse menukaart. Houd de Fenikso en onze website in de gaten voor het volledige programma. De eigen bijdrage is € 20 voor leden en € 25 voor niet-leden. Het avondeten – Limburgs menu - is optioneel en dit zal € 20 bedragen. Zet deze dag snel in je agenda en meld je uiterlijk vóór 9 juni aan via esperanto-nederland.nl

Deelname is definitief als de betaling is voldaan.

Tot dan!

Emil Jacobs en Ron Winteraeken

Voor meer informatie:

info@esperantolimburg.nl

tel. 06 34789992

Sabaton la 24-a de junio en Maastricht

La Kultura Tago en Woudrichem pasintjare estis granda sukceso. Ĉi-jare ni, el Limburgo, organizas la Kulturan Tagon kaj ni ĝojas inviti vin en la belega urbo Maastricht.

Ni promesas al vi interesan tagon plenan de aktivaĵoj en agrabla etoso. Limburga kuko certe ne mankos kaj ni jam povas malkaŝi ke parto de la programo estos en la kadro de Maastricht kiel fortikaĵa urbo.

Nia programo komenciĝos je la 10:30 kaj finiĝos je la 18:00 a horo. La vespera manĝo – limburga menuo - estas fakultativa. Membroj de Esperanto Nederland pagas € 20. Se vi ne estas membro, vi pagas € 25.

La vespermanĝo estas fakultativa kaj necesas krompagi € 20. Notu rapide ĉi tiun tagon en vian agendon kaj aliĝu per la retejo de esperanto-nederland.nl antaŭ la 9a de junio.

Via partopreno estos definitiva kiam la sumo estas pagita.

Ĝis tiam!

Emil Jacobs kaj Ron Winteraeken

Por pli da informoj:

info@esperantolimburg.nl

tel. 06 34789992



Revuo-interŝanĝo

Benata Hengstmengel-Koopmans

Revuo-interŝanĝo de Benata Hengstmengel-Koopmans estas projekto por legi pliajn revuojn. Vi povas kontakti min pere de la retadreso benata@zonnet.nl.

Revuo Kontakto: 57-a jaro, numero 309, 2022-3 (<http://Kontakto.tejo.org>)

Temo: Egaleco. Diverseco kaj inkluzivigo. Ĉu sufiĉe?

-pri fondo de nova landa sekcio de TEJO: 'Indonezia Esperantista Junulara Organizo', kun malgranda enkonduko al la java lingvo.

-pri eŭraj monbiletoj kun faciligoj por blinduloj kaj malbonvidantoj en la artikolo 'Mono mondon regas'.

Monato: 43-a jaro, decembro 2022/12 kaj 44-a jaro, januaro 2023/01 (www.monato.be)

El la decembra numero:

- 'Svislando, ĉu modelo por Japanio?', pri oficialaj japan-svisaj rilatoj ekde 1864. Svislando estis idealigita pro fikciaj personoj (kiel ekzemple Heidi).
- 'Kanado ŝanĝiganta?' pri nova populisma parti-estro.
- Letero el Moskvo, daŭrigo de 'Taglibro de l'milito' de anonima A.A.
- 'Skrablo en Kubo', mencias ke oni ludas la tabulludon skrablo en 131 landoj.

El la januara numero:

- 'Ĉu Koreio malaperos?', demandas Cho Sung Ho, ĉar la fekundeco en 2020 estis nur 0,84%, la plej malalta en la tuta mondo.
- Bert de Wit skribas pri 'Nitrogenkrizo en Nederlando'. Temas pri derivaĵo de la gaso kiu preskaŭ je 80% plenigas la aeron. Pro agrikulturo, industrio kaj trafiko estiĝas tro da nitrogenokcido kaj amoniako.
- 'Diana Abgar: la unua ambasadorino de la mondo' laŭ Lida Elbakjan el Armenio. Ŝi estis armena verkistino, publicistino kaj

diplomatino, kiu naskiĝis en Hindio kaj ekloĝis en la japana Jokohama (vivis de 1859-1937).

Nova Irlanda Esperantisto, numero 156, decembro 2022 (www.esperanto.ie)

La unuan fojon mi ricevis tiun ĉi revueton. 'La antaŭa numero aperis en la printempo de 2020 pro KOVIM-19'.

- enhavas deklaron de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo (Kanado).

Norvega Esperantisto, numero 5-6/2022

- enhavas interalie longan intervjuon kun la blinda membro Otto Prytz, kiun la landa kunveno elektis kiel honora membro.

La Revuo Orienta, 103-a jaro, numeroj 10 (1201) kaj 11 (1202), oktobro + novembro 2022

- la oktobra numero raportas pri la UK en Montrealo.
- la novembro numero enhavas raportojn de la 109-a Japana Esperanto-Kongreso.
- en ambaŭ numeroj aperas artikoloj pri la japana indiĝena popolo Ajnuoj.

Sennaciulo, oficiala organo de S.A.T., januaro-februaro 2022, numero 01-02 (1300-1400) (www.satesperanto.org)

- 'Komuna Deklaro de SAT Plenum-Komitato kaj la Organiza Komitato por la 95-a SAT-kongreso, kiu devintus okazi en Moskvo (en 2022)'.
- artikolo pri 'Literaturaj premioj por Afrikanoj', iom post iom ankaŭ por virinoj. Roland Platteau skribas 'En la socio la Conatus estas plago!'. Temas pri la Conatus de Spinoza: 'la volo persisti en sia esto, kaj kreski, ĉiam pli...'



Harca Esperanto Kuriero, Informilo de Interkultura Centro Herzberg (en Harz), 46-a jaro, aŭgusto-oktobro 2022, numero 3 (196)

- Novaĵoj pri la Esperanto-urbo Herzberg: inter alie konstanta serĉado de raraj Esperanto-materialoj por la fakbibliotekoj kaj la special-kolektaĵoj/arkivmaterialoj.
- Publika informagado: okazis en la urbocentro de Herzberg am Harz kun publika informtablo en la aŭtuno de 2022.

Literatura Foiro, kultura revuo en Esperanto, organo de esperanta PEN-centro, jaro 53, decembro 2022, numero 320

- 'Tera beleco – La naturo laŭ Van Gogh', poemo de Elena Popova.
- 'Kiel la plurlingveco povintus fortigi Eŭropon', artikolo de Perla Martinelli.

Heroldo de Esperanto, Monata Informa Gazeto de Kultura Centro Esperantista, Esperanto-Domo La Chaux de Fonds (Svislando), 98-a jaro, oktobro 2022, numero 10 (2337)

- frontpaĝa artikolo: 'Kiel eksterulo vidas niajn ĉefajn bibliotekojn kaj arkivojn en la danuba areo'.

Dia Regno, numero 5-2022 (numero 956)

- Gerrit Berveling publikigas la trian parton de 'La morto de Peregrino, Lukiano al Kronio: bondezire!'
- anonco de la 72a KELI-kongreso en Bjalistoko (Pollando), de 5-12 aŭgusto 2023

Esperanto - La Bitbulteno 84, Bitanovaj-letero de Hispana Esperanto-Federacio, Dulingva eldono (Esperanto.es)

- pri diversaj kursoj kaj stipendioj kiuj okazis/estis mendeblaj en 2022.
- anonco de Hispana Kongreso okazonta en Sevilo, de 12-15 oktobro 2023.



Dianto Reed Quintet

La ensemblo Dianto Reed Quintet havas Esperantan nomon. Rete ni demandis kiel ili elpensis la Esperantan nomon, kiel kaj kie ili ekkonis la lingvon kaj ĉu ili mem parolas Esperanton kaj uzas la lingvon dum turneoj. Ni ankaŭ demandis ilin kiel ili alvenis en Amsterdamo.

Ovida Martí Garasa respondis la demandojn: *"About the Esperanto, we chose it because it is a universal language, such as music. Then we chose the anjer because it is a Mediterranean flower, and since we are Spanish we consider ourselves Mediterraneans. So the connection was there from the beginning! Unfortunately none of us speaks Esperanto, but in every concert or interview we mention it and it's really nice to see the reaction of the audience."*

"We came to Amsterdam to study our Master in Classical Music at the Conservatorium van Amsterdam, it was here where we all met and in October 2020 we created Dianto Reed Quintet. We are planning to stay in Amsterdam as long as possible, we feel home here in the Netherlands."

Pri Esperanto, ni elektis ĝin ĉar ĝi estas universala lingvo, samkiel muziko. Tiam ni elektis anjer [dianto], ĉar estas mediteranea floro, kaj ĉar ni estas hispanoj ni konsideras nin mediterane-anoj. Do la rilato ekzistis de la komenco! Bedaŭrinde neniu el ni parolas Esperanton, sed en ĉiu koncerto aŭ intervjuo ni mencias ĝin kaj estas vere agrable vidi la reagon de la publiko.

Ni venis al Amsterdamo por studi por majstriĝi pri Klasika Muziko ĉe la Konservatorio de Amsterdamo, tie ni ĉiuj renkontiĝis kaj en oktobro 2020 ni kreis Dianto Reed



Foto: Jessie Kamp

Quintet. Ni planas resti en Amsterdamo kiel eble plej longe, ni sentas nin hejme ĉi tie en Nederlando.]

Dankon al Anneke Schouten-Buys, kiu atentigis pri ĉi tiu ensemblo.

La ensemblo konsistas el María Gonzalez Bullón (hobojo), María Luisa Olmos Ros (klarneto), Ovidi Martí Garasa (altosaksafono), Erick Rojas Toapanta (basklarneto) kaj María Losada Burgo (fagoto).


Dianto Reed Quintet estis gajninto de Grachtenfestival Conservatorium Concours 2021, konkurso kiu donas al studentoj ĉe nederlandaj konservatorioj ŝancon prezenti sin al la ĝenerala publiko.

Sofino Mensen

5-a de nov. 1926 - 14-a de jan. 2023



Malĝojigis min la informo pri la forpaso de mia “Esperanto- kaj nederlanda patrino”, interalie kolegino en la instruado de Esperanto, kiun mi bonŝancis koni dum la lastaj tridek jaroj. Akceptu mian ĉi-suban nekrologon okaze de la forpaso de Sofino Mensen nederlanda esperantistino kaj Cseh-instruistino.



Sophia Mensen (por mi nur Sofino) naskiĝis la 5-an de novembro 1926 en la iama komunumo Hillegersberg, hodiaŭa kvartalo de Roterdamo. La gepatroj estis fervoraj social-demokratoj kaj agis politike. La patro (stanisto) estis membro de la komunuma konsilantaro dum pli ol dudek jaroj ĝis la germana okupacio. La patrino (dommastrino) estis fervora batalanto por balotrajtoj kaj virina emancipiĝo. Ŝiajn klarvidon kaj agemon heredis ankaŭ la filino. La etoso en la familio estis malferma kaj progresema. Malgraŭ la limigita lerneja edukado la gepatroj havis vastan sciencan kaj kulturalan interesojn. Esperanto kun sia interna ideo varmigis ilian koron.

La malriĉeco en kiu ili vivis kun siaj tri infanoj (Sophia, Magda, pli aĝa fratino de Sophia, kaj Piet, la frato) ne ebligis, ke la infanoj sekvu studojn krom tiu de la baza edukado. Sofino frekventis etullernejon, bazan lernejon kaj kvarjaran mezlernejon kaj post la studoj ŝi eklaboris en du oficejoj. La tielnomatan ‘malsatvintron’ (1944-45) la familio travivis en profunda malriĉeco. Familia legendo konserviĝis pri la kuraĝo kaj persistemo de la 16-jara Sofino, kiun oni sendis en tiu vintro al la regiono Twente (pli ol 50 kilometrojn for) por akiri nutraĵon. Kaj ŝi sukcesis! Ŝi revenis fiere kun 30 kilogramoj da faruno sur sia biciklo, malgraŭ la frosto kaj danĝeroj esti priŝtelita aŭ atakita en tiu mizera epoko.

Post la milito ŝi eklaboris en konfekcia fabriko Peek & Cloppenburg kiel kudristino, sed ne ĉesis revii pri kleriĝo, al kiu inspiris ŝin la nomo Sophia (saĝeco). Paralele kun la laboro ŝi sekvis vesperan profesian

trejnadon por instrukvalifiko. Akirinte sian diplomon ŝi ekinstruis en 1947 en la Montessori-lernejo de Kralingen.

Ŝi edziniĝis en la jaro 1952 kaj transloĝiĝis al Midelburgo en la jaro 1956. En 1957 tie ŝi naskis filinon Aletta kaj en 1959 filon Jaap. Sofino akiris Montessori-diplomon en 1953 kaj ekde 1969 jam kiel direktorino laboris en Montessori-lernejo en Utrecht (ili loĝis tiam en Culemborg) kaj poste en Soest ĝis 1977. En tiu jaro kun sia dua edzo Jan van Venrooy ŝi transloĝiĝis al Francio kaj vivis tie ĝis 1982, kiam ili revenis al Midelburgo, kie Sofino restis ĝis sia forpaso.

Sofino esperantistiĝis en la jaro 1973 (ĝuste 50 jarojn antaŭe) kaj diplomiĝis pri la Cseh-metoda instruado en la jaro 1989. Por sia propra instrulaboro ŝi adaptis la Cseh-metodon kaj riĉigis ĝin per multe da bildoj. Ŝian zorge pretigitan instruhelpilaron ŝi donacis al la kolekto de edukado.net je 10 jaroj antaŭ sia forpaso. Meze de la 70-aj jaroj Sofino kontribuis kun siaj 21 lernantoj el Soest al la fama dujara lerneja eksperimento, organizata de Szerdahelyi, cele al la scienca pruvo de la propedeŭtika valoro de Esperanto. Ĝin partoprenis dek unu lernejoj: St. Gerard (Belgio), Hannebont kaj Le Mans (Francio), Soest, Waalwyk kaj Wormer (Nederlando), Ateno (Greklando nur dum unu jaro), Peine, Balge kaj Dollbergen (Germanio) kun entute 327 lernantoj. Pri la tuta eksperimento legu ĉe la raporto Helmuth Sonnabend: Esperanto: lerneja eksperimento.

Ŝi instruis ekde la jaro 1985 ĝis 2004 dufoje jare dum studsemajnfinoj, organizitaj de la Nederlanda Esperanto-Asocio kaj inter la jaroj 1991 kaj 2004 ĉiujare dum la Printempa Semajna Internacia (PSI) organizita fare de la Germana Esperanto-Asocio. Sofino gvidis semajnan kurson kun Katalin Kováts en Bretonio (Pluezek) en la naŭdekaj jaroj, dufoje staĝon en Agde kaj Amiens, same en Francio kaj ĝis siaj naŭdekaj jaroj instruis laŭbezone individuajn interesiĝantojn en sia loĝurbo Midelburgo. Pro sia agado ŝi eniris la Panteonon de edukado.net en decembro 2010.

Sofino tre ŝatis vojaĝi, plej ofte en organizitaj karavanoj de ANWB, pere de sia eta ruldomo, komence kun sia dua edzo kaj poste kuraĝe ankaŭ tutsola. Dum la vojaĝoj ŝi ofte partoprenis la Universalajn Kongresojn de Esperanto, haltis por gvidi Esperanto-kursojn. Sofino tre ŝatis ankaŭ manlabori, lerte trikis, kaj volonte, kvazaŭ profesie, kudris kaj instruis kudradon en sia hejma ateliero. Ŝi estis aktiva membro de pluraj civilaj organizoj,

gvidis entombigajn ceremoniojn ĉe humanisma asocio, kaj eĉ en siaj naŭdekaj vivjaroj volontulis en siaurba 'Riparkafejo' kie ŝi riparadis vestaĵojn de bezonuloj.

En la lastaj 15 jaroj de sia vivo ŝi retiriĝis de la aktiva Esperanto-vivo, kuraĝe konfrontis kelkajn maljunaĝajn malsanojn kaj perdon de sia amata filo, tamen optimisme kaj malferme donis sian atenton kaj koron al nova kunulo kaj ties amanta familio. Ŝi pasigis belajn maljunjarojn ĝis ŝia forto definitive elĉerpiĝis kaj ŝi forlasis tiun mondon en la zorgoplena ĉeesto de sia filino, Aletta.

Sofino forpasis la 14-an de januaro 2023, en Midelburgo, Nederlando.

Ŝian agemon, fortan karakteron kaj batalemon por paco, por virinaj kaj homaj rajtoj pluraj adiaŭantoj rememoris en siaj aŭdiaŭaj paroladoj okazintaj la 21-an de januaro 2023 en Midelburgo. Kara Sofino, ripozu en paco.

Katalin Kováts

Jan van Dijk

1952 - 2023



La 31-an de januaro Jan van Dijk mortis en amsterdama hospitalo post dua cerba infarkto. Post la unua en la 23-a de januaro la kuracistoj opiniis ke li havas bonan ŝancon reveni al sia antaŭa stato, sed neatendite trafis lin la dua infarkto. Jan estis 70-jara kaj eklernis Esperanton antaŭ 7 jaroj. Li ofte partoprenis la kunvenojn de la amsterdama rondo kaj

pliprofundigis sian lernadon de la internacia lingvo per kurso ĉe Bert. Unue, tiu kurso (per « Paŝoj al plena posedo », k.s.) okazis en Aerdenhout, sed dum la kronvirotempo la kurso okazis komputile, per tekstoj kun demandoj kiujn Jan fidele respondis.

Li ŝatis la lingvon kaj li ŝatis briĝi (en amsterdamaj kluboj), go-ludi kaj ŝakludi. Dum la funebra ceremonio en Zorgvlied, la 8-an de februaro, parolis gefamilianoj kaj reprezentantoj de la asocio en kiuj li aktivis kaj ankaŭ najbarino pri lia laboro por la komuna ĝardeno. Li laboris antaŭ sia pensiigo kiel ekonomo por ING-banko. Ni bedaŭras lian forpason kaj memoros lin kiel afablan, inteligentan kaj fidelan viron. Ni kondolencis la filinon kaj ŝian familion.

Bert de Wit

Piet Bijvoets

13-a de okt. 1930 – 27-a de dec. 2022

La filino telefone anoncis la morton de sia patro. Ŝi rakontis ke li dum jaroj estis esperantisto. Li aliĝis al Esperanto Nederland en 2019. Ŝi pensis ke li estis membro dum multe pli da jaroj.

Ineke Emmelkamp
Sekretario Esperanto Nederland



Holokaŭsta Memoro

Ĵaŭdo, la 4-a de majo, estas la Tago de la Memoro. Por ĉi tiu tago la mesaĝo de UEA okaze de la internacia tago de Holokaŭsta Memoro, 27-a de januaro 2023, bone taŭgas.

La holokaŭsta memoro kaj klerigo pri viktimoj kaj supervivintoj de naziismo estas ne nur momentoj de funebro kaj honorigo. Ili estas ankaŭ gravaj atentigoj pri nuntempaj viktimoj de persekutado kaj misinformado. Pli ol ĉiam, ni bezonas kontraŭbatali malaman paroladon, antisemitismon kaj aliajn antaŭjuĝojn, kaj preventi genocidon.

Ni aparte memoras la familianojn de Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kaj la multajn aliajn persekutitajn esperantistojn, kiuj perdis siajn vivojn. Preskaŭ ĉiuj rektaj familianoj de Zamenhof pereis: nur unu lia nepo transvivis tiujn terurajn jarojn. La nazia Germanio kontraŭstaris Esperanton ĉar ĝia kreinto estis judo kaj pro la tutmondistaj kaj homrajtaj idealoj de la Esperanto-movado.

Universala Esperanto-Asocio funebras tiujn kredantojn pri internaciismo kaj internacia kompreniĝo kiuj, ĉu pro sia raso aŭ fizika stato, ĉu pro siaj politikaj aŭ sociaj konvinkoj, pereis je la manoj de la nazioj. Ni honoras la memoron de la multaj



Foto: "Anne Frank, Wassenbeeldenmuseum Amsterdamo". de Gazetasecret el Pixabay

esperantistoj kiuj tiel pereis kaj ni rekonas la sindonon kaj kuraĝon de tiuj kiuj defuis la fortojn de teroro por savi tiujn malmultajn kiuj, minacatajn de murdo, transvivis.

Nia asocio prenas homajn rajtojn, tiel kiel ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, kiel ĝeneralajn principojn kaj esencajn kondiĉojn de nia agado. Kiel movado kiu strebas al interhomaj kompreniĝo kaj kunlaboro, ni solene promesas, fronte al la ekzemplo de la Holokaŭsto, fari nian eblon rezisti al maljusteco kie ajn kaj kiam ajn ĝi okazas.

"Pendelen in taal en gevoel"

Interview in de podcast van Marieke de Goede met Federico Gobbo, De Goede Gesprekken #12.

Meerdere talen spreken en heen en weer reizen tussen verschillende plaatsen kan tegelijkertijd verrijkend en vervreemdend zijn. Federico Gobbo, bijzonder hoogleraar Interlinguïstiek en Esperanto, ondervond dat zelf en begon er een podcast over tijdens de eerste lockdown in 2020: The Commuters. Decaan Marieke de Goede gaat met hem in gesprek over podcasts, taal, mobiliteit en identiteit. 'Alle meertaligen weten dit: wanneer je een andere taal spreekt, ben je een net iets andere versie van jezelf.' Beluister de podcast (Engels gesproken): <https://mallonge.net/233DGG>



Vortsercênegmo

La temo de la enigmo de çi tiu eldono estas Sezonaj diferencoj.

Solvo de la antaŭa vortsercênegmo estas:

"Espereble la nova jaro alportos kontentecon."

La ĝusta solvo estis sendita de Frans Reibestein- v.d. Does, Mariska de Jonge kaj Ralph Schmeits.

La ludo estas kreita de Det Koning.

Sendu vian solvon al ni. Ni metos la nomojn de tiuj, kiuj solvis la vortsercênegmon en la venontan numeron.

Vortoj:

dauw	- r
dooiën	- d
lentemaand	- m
maanden	- m
maanlicht	- l
mist	- n
'n briesje	- v
regenboog	- ĉ
seizoenen	- s
stapelwolk	- k
't gaat regenen	- e
't onweert	- f

u	o	n	v	e	t	e	r	b	u	l	t	e	n	o
j	t	o	z	o	n	g	o	r	p	r	e	t	e	v
o	e	u	o	ĉ	i	e	l	a	r	k	o	s	h	o
t	t	i	d	r	u	j	n	m	p	d	u	o	s	f
a	n	p	a	r	o	i	o	l	a	n	n	p	o	u
n	e	o	m	b	t	p	u	n	f	r	i	e	s	l
o	v	l	r	m	i	v	m	l	o	l	t	o	u	m
m	j	i	o	i	o	r	o	e	k	z	m	o	l	o
l	o	r	d	s	b	r	d	e	t	e	e	n	u	t
u	g	b	o	e	o	u	n	o	r	n	e	s	m	o
n	u	n	r	j	g	u	s	t	n	b	i	p	u	n
l	t	u	t	o	s	e	a	n	u	e	n	r	k	d
u	n	s	n	n	e	g	l	l	u	a	s	l	p	r
m	e	p	i	r	o	s	o	i	o	s	r	t	t	a
o	l	a	v	s	s	a	g	e	v	u	l	p	o	s

't stortregent	- p
vogelnest	- b
voorjaar	- p
weerbericht	- v
weersverwachting	- v
winterslaap	- v
zomerdag	- s
zomersproeten	- l
zonnebloemen	- s
zonneschijn	- s
zonsondergang	- s
zonsverduistering	- s

Foto: Canva


Frazo:

Kiu scias pri Angelo Agosti?

Projekto kaŝaj voĉoj: Angelo Agosti, itala moskito en la harlema rezisto



Groepje Esperantisten uit de regio Haarlem in Zandvoort, rond 1930, bij het strandhuisje van Josephus Vrees. De vrouw is mogelijk de eerste vrouw van Agosti, (Josephina Antoinetta) Fie Bruikman. Agosti zelf is de eerste van links.



Angelo Agosti als oudere, uit zijn dossier.



Daniela Tasca bekijkt met een loep het dagboek van Angelo Agosti / Foto: United Photos/Laurens Bosch, uit: Haarlems Dagblad

Ni serĉas homojn, kiuj konis Angelo Agosti rekte aŭ nerekte.

La italo Angelo Agosti (1900-1985) vivis seninterrompe en Haarlemo inter 1925 kaj 1943.

En la 1930-aj jaroj ĝis ĉirkaŭ 1940, li estis teraco-laboristo (granita laboristo) kaj estrarano de la Sindikato de la Konstrulaboristoj. Li aktivis ankaŭ en la Federacio de Laboristaj Esperantistoj (eĉ kiel sekretario). Klubkunvenaj vesperoj de la Federacio okazis en la konstruaĵo De Centrale, konstruaĵo sur la Spaarne.

Inter 1940 kaj 1943 Agosti partoprenis la reziston en la Waarheid-grupoj sub la kaŝnomo Hendriks kaj Van Noord kaj amikiĝis kun Piet Vooren kaj Chiel Rusman.

Angelo Agosti kaj lia (unua) edzino Josephina Antoinetta (Fien) Bruikman (1900 -??) loĝis ĉe la sekvaj adresoj en Haarlemo:

- Lange Heer/Wijngracht
- Leeuwerikstraat 56
- Merovingenstraat 70
- Kloosterstraat 26 rood
- Frans Halsstr 25
- Reigerstraat 61
- Laborloko(j): President Steijnstraat 7b - Generaal Joubertstraat 7b.

Bonvolu kontakti kun viaj informoj Daniela Tasca M.: info@100italianen.nl.

Helpopeto de Eŭropa Esperanto-Unio

“Karaj gesamideanoj,

EEU/Europa Esperanto-Unio celas antaŭenigi Esperanton kaj lingvan justecon en la 27 landoj de la Eŭropa Unio. Nia retejo, EUROPO – bezonas ĝisdatigon, sed ni bedaŭrinde ne havas la monon por pagi iun por fari tion. Kiel prezidanto de EEU, mi apelacias al la eŭropaj esperantistoj kiuj estas teknike spertaj ke ili helpu nin.

Multegan dankon.

Seán Ó Riain

Prezidanto de EEU

<https://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Respondoj de la

Lingva testeto

Jen la respondoj de la lingva testeto de paĝo 7.

1) b. *Horzonozo* estas neformala termino por la malbonfarto ofte spertata post aviadila vojaĝo inter diversaj hor-zonoj (*tijdzones*) – do ekzemple kiam oni ĵus flugis de Novjorko al Amsterdamo kaj devas adaptiĝi al la 6-hora diferenco. En la nederlanda oni indikas ĉi tiun fenomenon per la angla pruntaĵo *jetlag*. La vorto estas kunmetita el *horzono* kaj la scienca sufikso *-ozo*, kiu kutime indikas ian malsanon. Oni ja povas senti sin sufiĉe malsana pro horzonozo...

2) La kvar prepozicioj kiuj kombineblas kun infinitivo estas *krom*, *anstataŭ*, *sen* kaj *por*. Sekve frazoj b) kaj ĉ) estas tute ĝustaj. Kontraŭe frazojn a) kaj c) oni devus alivortigi, ekzemple jene:

Per plendado vi nenion atingos aŭ *Plendante vi nenion atingos*
Antaŭ ol komenci mian laboron, mi ĉiam... aŭ *Komenconte mian laboron, mi ĉiam...*

Dum la lastaj jardekoj aperis tendenco (precipe inter junaj esperantistoj) pli vaste uzi prepoziciojn kun infinitivoj. Ĉu frazoj kiel a) kaj c) enradikiĝos, tamen restas demando. Por pli funda klarigo, vidu paĝojn 198-200 en *Esperanto – Grammatica met oefeningen*.

Arjen-Sjoerd de Vries



Esperanta kastelo Greziljono

La KulturDomo de Grésillon gastigas vin en granda bieno de 18 hektaroj por studi kaj uzi Esperanton. Restado eblas per malgranda buĝeto.

Dank'al granda parko, arbaro kaj herbejo, Grésillon estas perfekta loko por ĝui naturon.

Pli da informo: <https://mallonge.net/232grez>



Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we zoveel mogelijk in overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op. Stuur je bijdrage op naar: redakcio@esperanto-nederland.nl.



Ekzistas diversaj radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto

3ZZZ Radio

Ĉina Radio Internacia

Radio Frei

Kernpunkto

Muzaiko

Radio Havana Kubo

Varsovia Vento

Radio Vatikana

Diversmaniere vi povas aŭskulti elsendojn, ekzemple:

- aŭskulti rete: <http://esperanto-radio.com>

- aŭskulti per apo (nur Android): [Muzaiko](#)



Esperanto-radio
Muzaiko



28, 29 en 30 april 2023 Esperanto Studieweekend

Welkom

De voorbereidingen voor het studieweekend op 28, 29 en 30 april 2023 zijn in volle gang. Er zijn ook al aanmeldingen binnengekomen, dus als je verzekerd wilt zijn van deelname, wacht dan vooral niet te lang met je aan te melden!

Een van de eerste dingen die de organisatoren van studieweekends moeten doen is het zoeken van docenten. Gelukkig kunnen we nu melden dat de laatste persoon die we hebben benaderd net definitief ja heeft gezegd – dus het docententeam is rond voor het studieweekend dat zal plaatsvinden op 28-30 april. Er zal worden lesgegeven door Françoise Balza uit België, Rob Groeneveld uit Nederland, Bert de Wit uit Nederland, Federico Gobbo, oorspronkelijk uit Italië en nu woonachtig in Nederland, en Alex Humet, oorspronkelijk uit Catalonië en nu woonachtig in België. We hebben dus weer een zeer internationaal team!

Zoals gebruikelijk zullen de cursusniveaus variëren van absolute beginners tot gevorderden. Helaas is de beginnersgroep vaak maar klein. Toch is het studieweekend juist voor beginners een heel geschikte introductie tot Esperanto, want ze maken niet alleen kennis met de taal, maar ook met de typische sfeer van



een Esperanto-bijeenkomst. Heb je een partner, vriend, collega of buur die belangstelling voor Esperanto heeft getoond? Probeer dan zeker hem of haar mee te nemen!

We hopen we jullie in groten getale in Krikkenhaar te kunnen verwelkomen!

Voor wie Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of je Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen.

Wanneer Het studieweekend vindt plaats op vrijdag 28 tot en met zondag 30 april 2023.

Waar Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornerbroek.

De kosten voor dit studieweekend bedragen € 90,- p.p. (leden van Esperanto Nederland en NEJ of andere landelijke Esperanto-verenigingen betalen € 80,- p.p.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen door.

Meer informatie en het aanmeldingsformulier staan op de website van Esperanto Nederland: <https://esperanto-nederland.nl/studieweekend>

Ineke, Lilian, Arjen-Sjoerd

28a Jarkolekto, n-r 2
marto - aprilo 2023

Fenikso

PostNL
Port betaald
Port payé
Pays-Bas